

# NORDFRANCA ESPERANTISTO

*Monata Revuo de la Nordfrancaj Esperantistoj*

2 a Serio - 16 a Jaro

N<sup>o</sup> 8

JUNIO 1939

## EN FRANCLANDO, ĈE LA MARO!

...

**INTERNACIA LIBERTEMPO & PERFEKTIGA KURSO  
EN MALO-LES-BAINS ĈE DUNKERQUE  
1<sup>aa</sup> ĜIS 8<sup>a</sup> DE JULIO 1939**



*La Urbodomo de Dunkerque.*

Same kiel dum 1935-36-37-38 okazos en 1939 de la unua ĝis la oka de Julio sub la patronado de la Societo Franca por la Propagando de Esperanto (S.F.P.E., Paris) kun la helpo de la Esperantista grupo de Dunkerque (150 aktivaj anoj),

**5a Perfektiga & Konversacia Kurso, en la kadro de  
INTERNACIA LIBERTEMPA SEMAJNO.**



En la belega marbanurbo MALO-LES-BAINS (2 km. de Dunkerque) en esperantista pensio-hotelo "Eole", 158-160, Digue de Mer, mirinde situanta *vidalvide al la maro kaj la promendigo*.

Ĝin gvidos nia fame konata ĉe-instruisto **S. PRAGANO** el Bumanujo.

*Laŭ jena PROGRAMO :*

**MATENE.**

Perfektiga kaj paroliga kurso (de la 10a ĝis 12a horo) en Salono antaŭ la maro.

**POSTTAGMEZE.**

Banado, diversaj vizitoj, ludoj kaj promenadoj ĉe la maro sur la ebenaĵo el subtila varmeta sablo (notinde ke tute male ol en multaj banlokoj por banado oni pagas nenian takson kaj eĉ elspezo por kajuto ne estas ĉar la hotelo situas tute ĉe la maro).

**VESPERE.**

Diverstemaj prelegoj.

*Sabate san de Julio Granda publika Festo Franca-Esperantista en la salonego de la Urbdomo.*

*Dimanĉe. — Esp. Federacia Kunveno de Norda Francujo.*

*Marde. — Ekskurseto al la pentrinda arta urbeto Bergues.*

*Merkrede. — Vespere, "Gaja festeto" en Eole kun la Dunkerkanoj.*

*Ĵaŭde. — Intereseĝa vizito al la instalaĵoj de la haveno sub gvidado de s-ano ŝtata inĝeniero de la haveno kaj oficiala akcepto en la urbdomo de Dunkerque.*

Ankaŭ la kuirarto estas unuaranga.

Dank'al la nuna malalta kurzo de la franca valuto la prezoj estas tre favoraj (unu nederlanda guldeno estas proksimume 20 francaj frankoj).

Por plena pensio dum 7 tagoj de la unua de Julio posttagmeze ĝis la oka de Julio posttagmeze :

**340 fr. fk.** por persono en dupersona ĉambro (dulita) aŭ en tri-persona ĉambro (trilita).

**370 fr. fk.** por persono — same — sed ĉambro kun vido al la maro.

La supraj prezoj entenas ĉiun takson inkluzive kurskotizon kaj servomonon. Nur por trinkaĵoj oni pagos aparte.

Pasintan jaron partoprenis Francoj, Belgoj, Britoj, Nederlandanoj kaj Svedoj, inter ili ges-roj Stellan ENGHOLM.

Ĉiuj estis ege kontentaj kaj aperigis entuziasmajn artikolojn.

Por 1939 jam B.E.A. anoncis la organizon de karavano el Britujo.

Estas konsilinde anonci sin kiel eble plej frue, ĉar la favoraj supraj prezoj estos konsentitaj nur ĝis plenigo de la hotelo.

Postaj aligantoj devos loĝi en proksima hotelo same pura komforta kaj bone situata sur promendigo sed pagi 30 fr. fk. plie.

Tamen ili havos mangojn, kursojn kunvenojn kun la aliaj.

Sed tre malfruaj aligoj riskas esti rifuzataj.

340 fr. fk. korespondas proksimume al 17 ned. guld, kaj al 38 svedaj kronoj.

Bonvolu afable diskonigi al ĉiuj konatuloj kaj per gazetoj.

Pliajn ekzemplerojn petu ĉu al B.E.A. ĉu al "Esperanto-Dunkerque" France, kiu senpage sendos ankaŭ gvidlibron kun esperantlingva parto.



*La Strando de Malo-les-Bains*



*La Urbdomo de Bergues*





Internacia Semajno 1938.

### KELKAJ OPINIOJ

#### Pri Sro Pragano.

Fame konata en Esperantujo, superfluas pri li prezentado. Tamen la novaj samideanoj povos legi en "La Praktiko" (Nov. 1936) tutaĝan artikolon per kiu la Ĉe-Instituto rekomendas lin « kiel fervoran propagandiston, kiel talentan instruiston, kiel lertan preleganton kaj kiel kompetantan koniganton de la Esperanta literaturo... ».

#### Pri "Eole" de vizitintoj.

La restado en via ĉarma hejmo, via gastamo kaj agra-bleco estos ĉiam en mia memoro. Ĉion bonan mi deziras al vi kaj tutkore,

Lidia ZAMENHOF (6-6-37).

Neforgeseblaj estos la feliĉaj tagoj, kiujn ni pasigis ĉe "Eole" vera hejmo esperantista.

Sro BINGHAM el London (8-6-37).

En la triporda surborda hejmo esperantista jen la duan fojon venis la vagabonda bardo de Esperantujo kaj li kore volonte esprimas dankon pro la gastameco, pri la spontanea afableco de s-ino kaj f-ino Pessey kiuj agrabligis la liberajn horojn tiel samideanine, ke la impresoj restos ĉe mi en formo de bela memoro.

Mi deziras ke la esperantistoj kiuj iam venos ĉi tien, havu la saman atmosferon de amikeco por konservi la kredon pri efektiva ekzisto de "interna ideo".

Julio BAGHY el Budapest (14-2-38).

Septaga restado en hotelo "Eole" konvinkis nin ke ĝi estas la plej bona esperantista pensio ĉiurilate kaj ĝiaj mastrinoj la plej bonaj gastigantinoj kiujn oni povas trovi. Nian koran dankon pro la agrabla restado.

Stellan ENGHOLM el Svedlando (9-7-38).

## Rosendaël vous invite !

Les nombreux espérantistes du Nord qui répondirent à son invitation, l'an dernier à l'occasion de l'inauguration de la rue Zamenhof, ont conservé le meilleur souvenir du magnifique accueil dont les gratifia la riante "Vallée des Roses" et de l'inoubliable réception dans le splendide Hôtel de Ville.

Aussi, viendront-ils, encore plus nombreux, le 2 Juillet prochain, se joindre aux gesamideanoj d'Angleterre, de Hollande, de Belgique et de toutes les régions de la France, venus pour la "Internacia Semajno" qui aura commencé la veille.

Le 2 Juillet, à 10 h. 30 précises, réunion fédérale à l'Hôtel de Ville. Séance d'étude, consacrée aux questions les plus importantes pour l'avenir de nos groupements et le perfectionnement de chacun.

À 10 h. 30, à l'Hôtel Espérantiste "Eole", dans le salon face à la mer, repas en commun facultatif. Prix : 22 francs, boisson et service compris. Envoyer son inscription (sans paiement) avant le vendredi 30 juin, directement à "Eole", 158. Digue de Mer à Malo-les-Bains.

Le reste de l'après-midi se passera au bord de la mer en compagnie de nos amis étrangers et du professeur roumain Pragano.

Réduction sur chemin de fer 50 % par billets fin de semaine Station Balnéaire. De la gare de Dunkerque à l'Hôtel de Ville de Rosendaël : 10 minutes en tramway.

### Ordre du Jour de la Réunion.

- 1<sup>o</sup> - Allocution du Président;
- 2<sup>o</sup> - Divers moyens pour conserver les sociétaires dans les Groupes;
- 3<sup>o</sup> - Comment rendre les réunions plus vivantes;
- 4<sup>o</sup> - Pour réussir dans la conversation;
- 5<sup>o</sup> - Comment pratiquer l'Espéranto pendant l'été;
- 6<sup>o</sup> - Questions diverses, initiatives et propositions des membres.

## Tous à Malo-les-Bains

Le Samedi 1<sup>er</sup> Juillet à 20 h. 30, dans la Salle des Fêtes de l'Hôtel de Ville de Malo-les-Bains, Grande Fête Franco-Espérantiste suivie de Bal!!!

## L'Union fait la Force

Cinquante-deux ans ont passé, depuis que l'humble brochure de Zamenhof a paru au jour dans une modeste librairie de Varsovie. Certes, la semence n'a pas été perdue. Dans tous les pays du monde, la langue



internationale de Zamenhof a raliĉe l'élite intellektuale de toutes les classes sociales sans exception. Dans nos groupes espérantistes, nous voyons rassemblés autour du même idéal des ouvriers et des chefs d'industrie, des professeurs et des commerçants, des révolutionnaires et des conservateurs. Mais sur cette question de langue internationale, comme sur beaucoup d'autres, il semble qu'il y ait rupture et incompréhension entre l'intelligence et la force, entre les éléments intellectuels de chaque pays et les éléments dirigeants. Sans doute, les hommes d'Etats ont des préoccupations politiques et financières d'un intérêt plus immédiat et plus urgent. Mais enfin, nos fils apprendront avec stupeur et pitié qu'en 1914, quelques gouvernements seulement — l'Espagne, le Brésil, l'Etat de Maryland — avaient daigné prêter un peu d'attention au mouvement espérantiste et autoriser timidement dans les écoles l'enseignement facultatif de l'Esperanto. Pour en faire autant, les grandes nations européennes attendent sans doute que l'Esperanto soit enseigné officiellement dans les écoles du Haut-Oubanghi ! En attendant, les bureaux de l'Instruction publique, et cela pas seulement en France, traitent les Recteurs, les Professeurs de Facultés, les littérateurs même éminents, qui viennent leur parler d'Esperanto, à peu près comme l'Administration des Postes et des Télégraphes, en 1854, traitait le grand méconnu Bourseul, inventeur du téléphone 18 ans avant Graham Bell. Le chef du service télégraphique déclara textuellement à Bourseul, alors simple employé des postes, que le téléphone c'était de la "blague" et l'invita "à se tenir tranquille, s'il tenait à sa carrière".

L'attitude des gouvernements ne saurait d'ailleurs décourager les espérantistes. Comme on l'a dit énergiquement : « *On ne demande pas aux pouvoirs publics de faire les choses, on les fait soi-même. Si on les fait bien, les pouvoirs publics suivent, qu'ils le veuillent ou non.* » Il faut donc créer ces faits. Il faut donc que l'initiative privée en répandant la connaissance de l'Esperanto dans les divers milieux réalise de plus en plus l'entente internationale et par là, la solution de la partie sociale du problème, de façon que les gouvernements n'aient qu'à enregistrer le fait accompli. La meilleure manière actuellement de réaliser le fait accompli, c'est de se grouper. Il y a dans nos groupes plusieurs centaines d'Espérantistes qui pratiquent et utilisent la langue internationale ; il y a plusieurs milliers d'approbateurs platoniques. Il n'en reste pas moins vrai que trop d'amis de l'Esperanto négligent de s'affilier au groupe local. En se tenant à l'écart, ils retardent la victoire de l'idée qui leur est chère. La langue internationale, pour triompher de l'ignorance et des préjugés, a besoin de la juxtaposition de toutes les volontés, et de la force irrésistible qui résulte de l'union des cœurs et de l'unité de plan.

H. M.,

*Agrégé de l'Université.*

## Angulo de l'Kuiristo !

**KIAMANIERE ĈIUFOJE SUKCESI "MAYONAISE" - SAŬCON**

**Recepto po unu litro proksimume**

Estas necese havi : 1 litron da oleo (tre klara), 1/10 da vinagro (laŭ ĝia forto), 6 ovoflavojn, 10 gramojn da salo, 1 pinĉprenon da blanka pipro.

En supujon aŭ salatujon metu la ovoflavojn, salon, pipron kaj supkuleron da vinagro ; miksadu dum unu aŭ du sekundoj, ne pli. Lasu la miksajon, kvar aŭ kvin minutojn sen ĝin movigi. Poste verŝu oleon, guton post guto, movigante laŭ densiĝo de la saŭco.

Iom post iom, daŭrigu la verŝadon de la oleo ĝis la saŭco fariĝu densa. Ĉe tiu momento aldonu kelkajn gutojn da vinagro por fluigi la saŭcon.

Poste, ne timante, verŝu oleon, pli kaj pli ; kiam la saŭco estos tro densa, por ĝin fluigi, aldonu denove kelkajn gutojn da vinagro.

Movigante, ensorbigu la tutan oleon. Gustumu, spicu ĝuste ; gustumu denove kaj mi diras al vi : Bonan apetiton !

Ankoraŭ unu vorton, afablaj legantinoj. Estas *Tute Neeble Sukcesi* mayonaise-saŭcon se oni uzas tro malvarman oleon, (oleo malklara estas tro malvarma) tiaokaze estas necese ĝin iomete varmigi.

Por la sama kialo, neniam lokigu la mayonaise-saŭcon (kiam ĝi estas farita) en tro malvarma ejo.

La mayonaise-saŭco estas fundamenta saŭco, sed oni povas diversmaniere prezenti ĝin.

— Per aldono de cerefolio, petroselo, kreso, kelkaj folioj de spinaĵoj kuiritaj dum du minutoj en bolanta akvo kaj kribrigitaj ; oni nomas ĝin "Sauce Verte" aŭ "Sauce Vincent" ; ĝi taŭgas perfekte kiel kuno por malvarmaj fiŝoj.

— Per aldono de askalonikoj kuiritaj en blanka vino kaj kribrigitaj ; oni nomas ĝin "Sauce Mousquetaire" ; ĝi taŭgas por la malvarmaj blankaj viandoj : bovidaĵo, kokidaĵo, ktp.

— Per supkulero da densa tomato, suko de citrono, esenco de anĉovoj (nur kelkaj gutoj) ; oni nomas ĝin "Sauce Tango" ; ĝi bone taŭgas por ĉiuj krustuloj kaj la malmolaj ovojn.

— Per aldono de mustardo, cerefolio, petroselo, drakunkolo, kaperoj, askalonikoj, ni havas la "Sauce Tartare" ; ĝi taŭgas precipe por blankaj fiŝoj legomoj, ekzemple : gadoj, angiloj, poreoj, asparagoj, ktp.

Oni povas alterni tiujn saŭcojn por tegi malmolajn ovojn. (Tio aspektas bele per aldono de rondeto da ruĝa beto sur ĉiu ovo.

Ch. AUCERNE.

## NI DAŬRIGU !...

**LA SPIONO**

Dum la milito, la timo de la spionoj estis granda. Personoj fantaziemaj aŭ facile impresblaj vidadis spionojn ĉie, aŭtentika historio, kiu okazis en la jaro 1917a montras la verecon de nia aserto.

La aŭtoro estis tiam subprefekto en Toulon.

« Sinjoro Subprefekto, mi opinias, ke mi devas sciigi al vi gravajn faktojn, de kiuj mia filino kaj mi estas la vidantoj de du tagoj aŭ pli vere du noktoj. De nia domo, staranta bulvarde de Grignan, mi vidis dufoje, ĉirkaŭ la deka vespere, lumajn signalojn faritajn sur



« la Faron. Ili estas kvazaŭ el sekreta kodo. Ĉar ofte venas submaraj « ŝipoj ĝis la eniro de la rodo, kaj jam okazis torpedado de pluraj ŝipoj, « mi pensis ke estas interkorespondado inter tiuj faktoj, kaj estus saĝa « apliki seriozan kontrolon por provi malkovri la farintojn de la si- « gnaloj. »

Tiu letero, kiun mi trovis iun matenon inter miaj poŝtaĵoj kaj estis korekte skribita, altiris mian atenton, kvankam mi ne ŝatas la anoni- majn sendaĵojn. Sed ni estis en tempo, kiam nenio devis esti malzor- gita, ĉar temis pri nacia defendo. Kaj haveno tia, kia Toulon, de kie foriris tiom da ŝipoj ŝarĝitaj per soldatoj, per municioj, per provizu- maĵoj, k.t.p. devus esti unu el la celoj de la malamikoj.

Do mi venigis la ĉefkomisaron de la ŝtata polico, kaj mi konigis al li la komunikacion, kiu ĵus estis farita al mi. Mi petis, ke li komisiu kelkajn el siaj plej bonaj policanoj por observi kaj poste detale raporti tion, kion ili estus povintaj vidi.

Kelkajn tagojn poste, la ĉefpolicano venis por raporti pri la rezul- tatoj de la observado, kiun li organizis. Du el liaj policistoj estis poste- nigitaj dum du sinsekvaj noktoj sur la bulvarado Grignan, kun ordo lokalizi, se eble, ĉiun suspektan lumon aperantan sur la deklivoj de la Faron. La unuan nokton, nenio estis menciita, sed la duan nokton, kontraŭe, inter la dudekdua kaj la dudektria horoj, ili nete rimarkis lumon ripetitan je malegalaj intertempoj, dum ĉirkaŭ kvaronhoro. Tiu lumo ŝajne elvenis el malgranda vilao; tute blanka, kies lokon ili estis povintaj noti sufiĉe precize. La komisaro do intencis, se mi aprobas lian vidpunkton, meniri vespero, kun kelkaj liaj policuloj, proksime al la aludita vilao: ili provos kapti ĉe la ago la aŭtorojn de la signaloj en la okazo se ili rekomencos. Mi donis al li plenpermeson, kaj li promesis agi kun prudenteco, kiu estas tute necesa en tia faro.

Nu, jen kion li malkovris.

Kiel decidite, li kun liaj viroj, surgrimpis la vojeton, kiu kondukas ĝis la antaŭe lokalizita domo, kaj ili sin kaŝis en loko ŝirmita, de kie ili povus facile observi la agojn de la loĝantoj. Precize je la deka kaj kvarono, ili ekvidis la lumon, kiu devenis de lanterno, kiun viro tenis en la mano kaj movadis. Tiu lumo estis videbla dum kelkaj momentoj, poste ĝi malaperadis, por reapari poste, je neregulaj tempo. Tio povis esti komprenita kvazaŭ lumaj signaloj, havantaj kaŝitan signifon, kiel diris la ricevita letero.

La ĉefpolicisto ne hezitis. Li ekkuris al la ĝardeno kaj alparolis la viron, kiu funkciigis la suspekteblan lanternon.

— He, sinjoro, kion vi faras tie ?

— Kion mi faras ? Nu vi bone vidas, mi supozas.

— Mi vidas, ke vi faras signalojn per via lanterno. Sed mi volas scii tion, kion tio signifas !

— Signalojn ! Mi faras signalojn, mi ? Nu, bona Dio, jen malica petolaĵo !

Kaj la viro ridadis el la tuta gorĝo. En tiu momento, lia edzino, aŭdinte bruon, eliris siavice el la vilao.

— Ĉu vi aŭdas, Arlette, kriis li al ŝi, jen sinjoro kiu asertas ke mi faras signalojn. Signalojn al kiu ? Al la luno aŭ al la planedo Marso ?

Novajn ridajn eksplodojn. Dum tiu tempo, nia komisaro estis alprok- simiĝinta :

— Ne temas pri ŝerco ! Mi ordonas al vi, ke vi klarigu viajn agojn pere de la lanterno. Mi estas la ĉefpolicisto, kaj mi rajtas demandi vin !

— Do, oni ne plu rajtas nun ĉasi la helikojn en sia ĝardeno ?

— Ĉasi helikojn ! Ili estas helikoj ?

— Eĉ ke ili estas belaj kaj bonaj. Ĉu ne, Arlette ? Jen se vi volas vidi, sinjoro Komisaro !

Kaj la bravulo, efektive, prezentis al li korbeton jam plenan de helikoj divergrandaj.

— Vi komprenu, tiuj bestoj manĝas miajn salatojn; do, mi, ves- pere, mi tiel kolektas ilin, altirante ilin per mia lanterno. Vidu, jen ankoraŭ du famaj ! Ĉar mi devas diri, ke oni purigas ilin kaj poste mia edzino preparas ilin bonege, kun ajlo !

Kaj la helikoĉasisto sin mallevis por daŭrigi la kolektadon. Malle- vante sin, li malaperigadis la lanternlumon, kiu denove aperadis kiam li releviĝis. Kaj jen la signaloj faritaj al malamikoj submarŝipoj ! La komisaro devis rekoni la evidentan verecon kaj post tiu ekspedicio, li longatempe restis tute skeptika kiam oni rakontis antaŭ li certajn spio- najn agojn.

*Tradukis ADE.*

## Esperanto en la lernejoj

En la kongreso de Fresnes, mankis la tempo por raporti pri la diver- saj fakoj de la Federacio. Tamen la ĝenerala sekretario aludis en sia raporto la gravajn progresojn, kiujn Esperanto faris en la lernejoj.

La ministra cirkulero de la 11a de oktobro 1938 permesas kaj eĉ rekomendas instrui la esperantan lingvon en la duagrada lernejo dum la "direktataj agadoj". Tiu cirkulero jam instigis multajn liceojn, kole- giojn, superajn lernejojn, k.t.p. al instruado de nia lingvo; kaj en niaj revuoj ekzistas regulaj rubrikoj en kiuj oni citas la nomojn de la "aki- ritaj" lernejoj. La agado de la unuagrada instruistoj ankaŭ estas men- ciinda. Ili facile ricevas permeson de siaj inspektoroj instrui esperanton, kaj multaj jam tion faris, ĉu en la ordinara klaso (direktataj agadoj), ĉu en la vespera klaso por gejunuloj.

Do, ni povas prave opini nin kontentaj pro la rezultatoj jam aki- ritaj. Tamen, se oni opinias, ke la fina venko de nia movado, grandparte dependas de la enkonduko de Esperanto en la lernejojn, kaj tio ŝajnas prava al ĉiuj, tiam oni povas sin demandi ĉu la klopodoj tiucelaj estas sufiĉaj.

Bone estas, ke oni permesis la instruadon de Esperanto en la ler- nejoj, bone ankaŭ estas, ke oni sciigis al ĉiuj tiun permeson; sed ĉu oni faris ĉion eblan por decidigi la instruistojn al tiu instruado ? Mi pensas, ke tie estas malforta flanko de nia movado. Oni estus kontenta vidi la diversajn asociojn de propagando, kaj en unua linio la S.F.P.E., vigne direkti sian propagandon al tiu celo.

A. DUMARQUEZ.



## Résultats du Concours "Fervorigilo" 1939

### Le Groupe d'Avesnes-sur-Helpe gagne la Coupe

Cette coupe, actuellement détenue par le groupe d'Arras, sera remise au groupe d'Avesnes, qui la conservera un an.

#### Classement individuel

- 1<sup>er</sup> Prix (25 fr. de livres): M. Charles Wersinger, du groupe d'Avesnes.  
 2<sup>me</sup> Prix (15 fr. de livres): M<sup>me</sup> Léonie Wersinger, du groupe d'Avesnes.  
 3<sup>me</sup> Prix (10 fr. de livres): M. Jean Deleury, du groupe d'Arras.

Les gagnants de ces prix achèteront eux-mêmes les livres d'*Esperanto* à leur convenance ; ils n'auront qu'à en adresser la facture acquittée au trésorier fédéral (M. Ch. Warusfel, 128, rue de Paris, à Douai, Nord) pour en être remboursés, à concurrence du montant des prix gagnés.

Les épreuves ont été corrigées par M. le D<sup>r</sup> Paul Desmoulin, président du groupe de Douai.

La Coupe "Fervorigilo" sera disputée à nouveau lors du Congrès fédéral du 28 avril 1940, à Abbeville.

Rappelons qu'elle a été gagnée successivement :

- 1<sup>er</sup> - en 1934, par le groupe de Dunkerque ;
- 2<sup>o</sup> - en 1935, par le groupe de Douai ;
- 3<sup>o</sup> - en 1936, par le groupe de Pont-sur-Sambre ;
- 4<sup>o</sup> - en 1937, par le groupe de Pont-sur-Sambre ;
- 5<sup>o</sup> - en 1938, par le groupe d'Arras ;
- 6<sup>o</sup> - en 1939, par le groupe d'Avesnes-sur-Helpe.

Aux termes du règlement (article 6), le groupe qui aura emporté le Challenge trois fois, consécutives ou non, conservera la Coupe définitivement.

## ALĜANTOJ AL LA KONGRESO

### 20<sup>me</sup> CONGRÈS FÉDÉRAL (FRESNES-SUR-ESCAUT)

#### 5a LISTO

#### Gesinjoroj :

- 170 Guillaïn S-ino, Hénin-Liétard.  
 171 Decardt F-ino, Hénin-Liétard.  
 172 Guillaïn F-ino, Hénin-Liétard.  
 173 Wouters F-ino, Hénin-Liétard.  
 174 Laborde F-ino, Hénin-Liétard.  
 175 Lompriet F-ino, Hénin-Liétard.  
 176 Urbain S-ro, Hénin-Liétard.  
 177 Brisset S-ro, Hénin-Liétard.

- 178 Lavedrine, Hénin-Liétard.  
 179 Crignan, Hénin-Liétard.  
 180 Juipin, Hénin-Liétard.  
 181 Havet, Hénin-Liétard.  
 182 Lompriet, Hénin-Liétard.  
 183 Splingard A., Hénin-Liétard.  
 184 Morel, Hénin-Liétard.  
 185 Zeller, Escoutpont.  
 186 Splingard Aug., Hénin-Liétard.  
 187 Bourgeois Lucien, Hénin-Liétard.

#### Gesinjoroj :

- 188 Leroy, Hénin-Liétard.  
 189 Vandewalle F-ino, Hénin-Liétard.  
 190 Furcy R., Abbeville.  
 191 Clément P., S-ino, Abbeville.  
 192 S-ro Baré A., Le Cateau.  
 193 Cleply, Bruay-sur-Escaut.  
 194 Huin, Anzin.  
 195 Avillon F-ino, Raismes.  
 196 Payen, Bruay-Thiers.  
 197 Ravez, Bruay-sur-Escaut.  
 198 Hiezarek, Bruya-sur-Escaut.  
 199 Taillez J., Bruay-sur-Escaut.  
 200 Taillez A., Bruay-sur-Escaut.  
 201 Duez, Escoutpont.  
 202 Sczpeski, Escoutpont.  
 203 Sczwarok, Bruay-sur-Escaut.  
 204 Sczybyla, Raismes.  
 205 Ansart, Escoutpont.  
 206 Deleury Jean, Izel-I.-H.  
 207 Deleury F-ino L., Izel-I.-H.  
 208 Rogez L., Arras.  
 209 Courquin C. F-ino, Fresnes-s/E.  
 210 Sandemant, Fresnes-sur-Escaut.  
 211 Givais, Fresnes-sur-Escaut.  
 212 Caille, Fresnes-sur-Escaut.  
 213 Tilmant, Fresnes-sur-Escaut.  
 214 Flinois, Fresnes-sur-Escaut.  
 215 Donnez, Fresnes-sur-Escaut.  
 216 Deline, Fresnes-sur-Escaut.  
 217 Simon, Fresnes-sur-Escaut.  
 218 Aloïs, Fresnes-sur-Escaut.  
 219 Lecreux, Fresnes-sur-Escaut.  
 220 Draïlez, Fresnes-sur-Escaut.  
 221 Paqint, Fresnes-sur-Escaut.  
 222 Désir, Fresnes-sur-Escaut.  
 223 Donnez, Fresnes-sur-Escaut.  
 224 Simon, Fresnes-sur-Escaut.  
 225 Provost, Fresnes-sur-Escaut.  
 226 Jourdain, Fresnes-sur-Escaut.  
 227 Maquet, Fresnes-sur-Escaut.  
 228 Lachapelle, Fresnes-sur-Escaut.  
 229 Bouton, Fresnes-sur-Escaut.  
 230 Lefebvre R., Fresnes-sur-Escaut.  
 231 Lefebvre, J., Fresnes-sur-Escaut.  
 232 Dubart, Fresnes-sur-Escaut.

- 233 Thionnet, Fresnes-sur-Escaut.  
 234 Flinois, Fresnes-sur-Escaut.  
 235 Lefebvre J., Fresnes-sur-Escaut.  
 236 Losse, Fresnes-sur-Escaut.  
 237 Ninauve F-ino T., Fresnes-s/Esc.  
 238 De Graveleyn E., Fresnes-s/Esc.  
 239 Desormeaux, Fresnes-sur-Escaut.  
 240 Maroille, Fresnes-sur-Escaut.  
 241 Grefte S., Fresnes-sur-Escaut.  
 242 Marquant A., Fresnes-sur-Escaut.  
 243 Roué H., Jeumont.  
 244 Noiret F-ino G., Jeumont.  
 245 Blique S-ino M., Jeumont.  
 246 Houbron A., Erquelines.  
 247 Requilé Michel, Bousois.  
 248 Somerling M., Nieuport (Belgique)  
 249 Lekieffre, Anzin.  
 250 Barret F-ino, Valenciennes.  
 251 Dumont, Valenciennes.  
 252 Lerch, Valenciennes.  
 253 Lorge, Valenciennes.  
 254 Martin, Marly.  
 255 Dupriez, Bruay-sur-Escaut.  
 256 Posière, Billy-Montigny.  
 257 Nussbann F-ino F., Lens.  
 258 Nussbann F-ino A., Lens.  
 259 Bernès, Raismes.  
 260 Longue-Epée, Bersée.  
 261 Dandimont, Arras.  
 262 Henry, Marpent.  
 263 Lemaire R., Douai.  
 264 Dubois, Escoutpont.  
 265 Gérard, Fresnes.  
 266 Delécluse A., Fresnes.  
 267 Broutin, Pont-sur-Sambre.  
 268 De Pauw F-ino, Pont-sur-Sambre.  
 269 Colmont, Pont-sur-Sambre.  
 270 Derome, Condé.  
 271 Vandamme, Lille.  
 272 Masselier, Neuilly.  
 273 Masselier S-ino, Neuilly.  
 274 Lekieffre S-ino, Anzin.  
 275 Petit, Paris.  
 276 Naoumoff, Paris.  
 277 Guillaume, Paris.  
 278 Paulier F-ino, Paris.

## Nia 20<sup>a</sup> kongreso en Fresnes-sur-Escaut

Jam pasis la belegaj, fratecaj tagoj de nia Federacia kongreso, kiu restos en la memoro de la partoprenintoj kiel ekzemplo de plej amikeca familiara esperanto-festo. Tre bone aranĝita de la grupo de Fresnes, ĝi absolute rave sukcesis por la kontentigo de ĉiuj Kongresantoj.



Ni resumu ĝin, por ke niaj samideanoj kiuj ne venis al Fresnes eksciu kiel la tuto tre glate funkciis.

Ekde la 15a, sabato la 6an, la kandidatoj al Superaj ekzamenoj kunvenis en la Urbdomo por la parola parto de tiuj konkursoj. Ĉu la ekzamenantoj estis tre severaj? La sinteno de la "viktimoj" ne ŝajnis tre firma, kaj pluraj el ili eble ne bone dormis la sekvantan nokton, dubante ĉu la rezultato estos kontentiga.

Je la 18a la jam alvenintaj esperantistoj grupiĝis, irante al Condé, kunportante flogarbojn kiun oni metis sur la tombon de Leŭtenanto Mauney, pioniro de esperanto en tiu regiono, mortigita en Maroko dum la jaro 1912. S-ro Degand, nia prezidanto, diris kelkajn kortuŝajn parolojn, al kiuj respondis la vic-urbestro de Condé. Sed jam vidiĝis tre malagrabla okazaĵo: dum sia vojaĝo en vagono, S-ro Degand ekmalsanis je la gorgo kaj estis tre malfacile kaj dolore por li paroli. Jen malsaneto alveninta en tre neoportuna momento.

Ĉiam en Condé la kongresistoj vizitis monumenton memore al 2 francoj pafmortigitaj de la germanoj en 1918, klinis sin antaŭ la arboj kie okazis la krimo, poste tra la remparoj iris al tre modernaj lernejoj ĵus konstruitaj, pri kiuj la urbo de Condé povas plene fieri. La horoj pasis... la stomakoj ekkris... kaj ĉiuj sidis plezure en restoracio por la vespermanĝo. Ĉirkaŭ la 21 h.  $\frac{1}{2}$  la kongresanaro pli kaj pli multnombra sin direktis al la Festoĉambro de Fresnes por tie plej agrable pasigi la vesperon... kaj eĉ iom pli.

Intertempe alvenis el Parizo niaj S.F.P.E. amikoj: F-ino Paulier, S-roj Petit kaj Guillaume kiujn akompanis S-ro Naoumoff. Ili ne venis kun malplenaj manoj, ne, sed kun la filmo "Antaŭen" kiun oni prezentis en la salono. Fortaj aplaŭdoj ĝin salutis tuj post la fino, kaj la ĉeestantoj sin turnis al la dancejo, — kruroj, brakoj, kapoj pli malpli elegante laŭ la dancanto — saltadis ĝis la 2-a matene, la dancoj estinte interromptaj kiel decas per englutado de kukoj, sandviĉoj, fumado de cigaredoj, trinkado de diversaj sensofigaĵoj eĉ kelkloke gaje furzis ĉampankorkoj.

Venis tamen la horo de enlitiĝo, kelkaj nelacigemaj eĉ akompanis personojn reirantajn al Condé, dum la maloftaj kiuj jam sin kuŝis pli frue estis vekitaj en siaj sonĝoj — ĉu unu ili ne sin turnis al dezirata salato?...

Ĉar en Fresnes ne abundas la hoteloj, la plej granda parto de la vizitantoj estis akceptitaj ĉe la loĝantoj kaj la morgaŭan tagon estis unuanima koncerto de laŭdoj al la afableco, frateco de niaj Fresne'aj samideanoj. Ne povis esti farite en pli bonkora familia sento ol en Fresnes.

Dimanĉon la 7an, Je la 9a matene komenciĝas la Federacia konkurso "Fervorigilo", kiun tiel ameme prizorgas sian kreinton: S-ro Humez. El ĉie kaj ĉiuminute alvenas samideanoj kiuj miras antaŭ la nombro de la esperantaj flagoj flirtantaj tra la urbo. Pli ol du cent, diris unu el la lokaj gvidantoj fakte estas ke neniam oni vidis tiom da ili en unu sola urbo. Rilate la urbdomo, ĝi havas flagfaskojn al ĉiuj el siaj fenestroj. La nomo Esperanto ne estas ignorata en la urbeto, Je la 10-a denove al la la festalono. Sur la estrado sidas la estraro federacia: S-ro Degand, la prezidanto; F-ino Colléatte, vic-prezidanto; S-roj Humez, prezidinto; Warusfel, kasisto; Centnerŝver kaj Brunet, sekretarioj dum en la salono vidiĝas F-ino Barret, vic-prezidantino, el Valenciennes; S-roj Houzé, Stuit, Cousteaux, Guillaume, Naoumoff, k.t.p., inter la 300 partoprenantoj. Sed oni rimarkas la ĉeeston de S-ro Chopinet, inspektoro de la unuagrada lernejoj, de S-ro Petit, ĝenerala sekretario de S.F.P.E. ambaŭ sidantaj kun la estraro. S-ro Degand salutas la kongreson per kelkaj

vortoj, pro lia daŭra gorg-malsano li estas devigata legigi sian paroladon per S-ro Dumarquez. Poste S-ro Chopinet parolas pri la sintenado de la por lernejoj administracio, ĝenerale tre favora al nia movado, la granda ebleco instrui esperanton dum "loisirs dirigés". S-ro Centnerŝver diras kelkajn adiaŭajn vortojn ne kiel esperantisto, ĉar li restas inter ni, sed kiel sekretario; li okupis tiun postenon dum 6 jaroj kaj estas dankinda por lia senlaca laboro dum tiu longa deĵorado. Sekve S-ro Brunet klarigas kiel li akceptis en decembro zorgi provizore, ĝis tiu kongreso, pri la sekretariado, por ke la federacio daŭru kiel eble plej bone; liaj ciferoj montras ke malgraŭ la cirkonstancoj ĉie oni laboris en nia federacio. 35 grupoj konigis al li ke okazas esp. kursoj en siaj urboj, ofte pluraj en la sama urbo. En 10 lernejoj ankaŭ esp. kursoj okazis. La Federacio je la dato de la kongreso amplezas 530 membrojn en 15 grupoj + 5 izoluloj sed ankoraŭ mankas la kotizoj de Bruay, Béthune, Lillers, Hazebrouck kaj Valenciennes. Tiujn oni firme anoncis. S-ro Warusfel faras ekzaktan raporton pri lia financa ofico kaj ĝoje estas eksciu kiel li admirinde ordigas la kontojn. Lia lasta nombro kiu anoncas pli ol 2.000 frank., en la kazo estas tondre aplaŭdata. S-ro Stuit anoncas ke dank'al lia arango de libro-servo, la federacio ricevas plian monon, kiu povos esti grava sumo se la grupoj bonvolu fari siajn mendojn rekte al li.

Fine oni balotas por la elektado de la nova sekretario, S-ro Brunet estas elektita tre facile, ne troviĝis alia kandidato... Je la ĝenerala voĉdonado estas aplaŭde reelektitaj: S-roj Warusfel, kasisto; Houzé, radio-sekretario kaj komisiito al la gazetaro; Brunet, por la izoluloj, kiun helpas S-ro Broutin por la regiono de Avesnes.

*Loko de la 1940-a Kongreso.* — Por la proksima jaro la grupo de Abbeville invitas la esperantistojn. La loko estas de ĉiuj elektita, kaj la federacia komitato ĝoje dankas la grupon de Abbeville por tiu bonvola arango.

S-ro Petit tiam disdonas 3 diplomojn el Ekspozicio de Paris "Artoj kaj tekniko" al S-roj Houzé, Vanvaerts kaj Waringhien. Denove merititaj aplaŭdoj salutas la 3 nomojn. La S.F.P.E. sekretario aldonas ke la proksima kongreso internacia — tiu de 1940 — okazos en Marseille.

Ĉar la Nordfranca Federacio devos esti oficiale reprezentata en Châlons, dum la Nacia kongreso, estas elektitaj por tiu reprezentado: delegito: S-ro Dumarquez; vic-delegitoj: Ges-roj Volqueman.

Sin ekskuzis pro nepartopreno al la kongreso: S-ro Deligny, St-Omer; S-ro Max, Lens; S-ro Hulin el Phalempin. Tutkoraj bondeziroj de baldaŭna resaniĝo estas sendataj al S-roj Deligny kaj Max, malsanaj.

Sin ekskuzis ankaŭ la Subprefekto de Valenciennes lasthore ĝenata ĝin ĉeesti. La kongreso ricevas telegramon de Sablé-sur-Sarthe kiu tre entuziasme salutas nin, kaj sendas alian al la Federacio de Centro-Okcidento kiu ankaŭ kongresas en la sama momento en la urbdomo de Le Mans.

Post tiu kunsido, la grupo de kongresantoj estas fotografitaj antaŭ la festoĉambro. Oni tiam iras al la Urbdomo kie okazas la Oficiala akceptado. Parolas la Urbestro, respondas nia federacia prezidanto, kaj S-ro Canonne je la nomo de la Laborista esperanta federacio salutas nin, al kio S-ro Degand reciprokas. Glasoj da ĉampano estas metitaj en la manojn de ĉiuj, kaj la esperantistoj gaje trinkas je la sano de la urbo, de la kongreso, de la loka grupo. Denove surstrate al la inaŭguro de strato Zamenhof, kiu situas apud la ĉefa placo, kontraŭ la urbdomo, vojo longa je pli ol 2 kilometroj; tre bonaj paroladoj je la memore de la Majstro, kantado de la himno, vizito al la monumento de la militmortintoj, kaj nun al la restoracio por la oficiala bankedo. Ĝi okazas en



tre gaja atmosfero, dio estas tre bone aranĝita, ĉiuj tutekore ridetas sin trovi meze de veraj samideanoj. La delegito de Abbeville, ĉirkau la fino de la manĝo, kolektas la aliĝojn al la estonta kongreso kaj lia mieno ŝajnas tre kontenta... Post la festeno denove al la Festsalono, kie tre bela festo okazas. Ni ne povas ne menciŭ la grupon de ĉirkaŭ 40 knaboj 10-12-jaraj kiuj ravis la publikon per la bela hora kantado, la kuabinojn kiuj prezentis skeĉon tre sukcesan, la tre junan pianistinon — nur 3-jaran — kiun ĉiuj aplaudis, la finan prezentadon de la heredo Klodarek.

Estis tempe foriri... sed multaj bedaŭris ke jam oni devis forlasis Fresnes, tiuj belaj tagoj tro rapide forflugas, sed S-roj Ninauve, Popiol, L chelle kaj kompanio estu certaj ke ĉiuj multe dankas kaj gratulas ilin por tia bona sukcesa festo.

Ĝis revido en Abbeville, kaj ke la hezitemuloj estu pli kuraĝaj proksiman fojon. Anstataŭ sidi en sia hejmo, kiel varme estas partopreni tian feston ! Nur tie oni sentas la internan ideon. Do, denove ĝis Abbeville.

KAR AMEMOL.

## TRA LA GRUPOJ

### AVESNES-SUR-HELPE

La grupo tre bone prosperas. La ĉiujara kurso por komencantoj finiĝis kaj tuj, la gvidanto, S-ro Raymond Couteaux, prezidanto de la Civila tribunalo, komencis perfektigan kurson.

Dum aprilo okazis la oficialaj ekzamenoj. Sukcesis la ekzamenon "Atesto pri lernado". Sinjorinoj : Brunois M., Bult  L., Wersinger L., F-inoj : Goubet N., Tabary Ch., Tabary O., S-roj : Bult  M., Copin N., Delannoy L., Mayot R.-C., Tabary J., Wersinger C.

Niaj plej sincerajn gratulojn al ĉiuj.

### DOUAI

A la demande de M. le Proviseur du lyc e de garçons, un cours d'Esp ranto, dirig  par M. Alb ric Humez, a  t  commenc  le 6 mai ; ce cours hebdomadaire, de deux heures, a lieu pendant les "loisirs dirig s". Dix-sept lyc ens y assistent.

### DUNKERQUE

Dimanche 4 juin,   10 heures,   l'H tel de Ville de Dunkerque auront lieu les examens  l mentaires et sup rieurs.

Le samedi 1<sup>er</sup> juillet,   20 h. 30,   l'H tel de Ville de Malo-les-Bains, dans la Salle des F tes : Grande F te Franco-Esp rantiste suivie de Bal. Ouverture du Cours d' t  de la S.F.P.E.

Dimanche 2 juillet,   10 h. 30,   l'H tel de Ville de Rosenda l (pr s Dunkerque), r union de la F d ration du Nord.

## Konstanta subteno

### 5a LISTO

Tutkoran dankon al niaj malavaraĵaj amikoj kiuj helpas nian revuon.

## Geesperantistoj, ni estas sur la ĝusta kaj bona vojo !

(El parolado de Papo Pie XII)

Estas urĝe tuj ke la nacioj provu interkompreniĝi. Ne estas eble havi trankvilon kaj ordon, kiam la spiritoj estas streĉegataj kaj mal-kontentaj. Do, efektive ne povas esti paco kaj trankvilo sen ordo, ĉar oftege miaj samaj filoj el sama tero estas dividitaj pro ardaĵ partio-bataloj kaj interesoj, kiam tiom multe da ili ne havas laboron kaj malsufiĉan nutraĵon, tial ili fariĝas allogaĵoj facilaj por malbonaj organizoj kaj doktrinoj. Sekve ke malstreĉo kaj trankvilo ne povas efektiviĝi, se la nacioj ne provus kompreniĝi inter si. Ne povas daŭri paco, kiam malfeliĉe eĉ inter la nacioj tro ofte mankas reciproka komprenado kiu nur sole povas kuraĝigi kaj antaŭenigi la popolojn en lumajn vojojn de civita progreso. Se la kontraktoj oficiale, solene subskribitaj kaj la parolo donita perdis tiun certecon kaj tiun valoron, kiu estas la disponebla bazo de reciproka fido, sen kiu la materiala kaj morala malarmado tiom multe dezirata iĝas tagon post tago pli malrealigebla.

Ordo, Justo, Bonkoro. La Paco ordon postulas, sed ordo sen justo ne ekzistas, ĝi postulas ke la leĝoj estu ordonataj por komuna bono kaj observataj ; ĝi postulas ke estu respektataj la liberon kaj homan dignon, ke la riĉecoj estu kiel eble plej bone disdonataj. Krome, la justo volas ke la religia agado ne estu malhelpata ĉar ĝi estras la veron, fonton de spirita vivo kaj bonfarantino de la homaro. Kaj kune kun la justo, estas necese la bonkoro, se inter mallarĝo kaj malvarmo la justo ne unuiĝus en frata harmonio al la bonkoro, tro ofte la okulo estas blinda por vidi la rajtojn de aliaj, la orelo iĝas surda al la voĉo kiu pravas, de la saĝa kaj bonvola aplikado el kiu povas neatendite sin montri eĉ en baraktoj la plej malfacilaj pravajn solvojn.

Finante, la Papo, sendis malĝojan alvokon al la individuoj, al la popoloj kaj al la gvidantoj petegante ilin ĉiujn praktiki inter si la Kristan bonkoron.

Tradukis : SAT-ano N<sup>o</sup> 19.683.

### PENSOJ

La plej pura ĝojo de la vivo, konsistas pasigi idealon en la realecon.





## DISTRAĴOJ



	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10
1										
2			■		■		■			
3		■								
4					■	■	■		■	
5						■	■			
6			■						■	
7					■		■			
8				■		■				■
9		■								
10				■		■		■		■

### HORIZONTALE

1. — Unua parto de konstruaĵo.
2. — Du konsonantoj (la dua sekvas la unuan). — Granda kreskaĵo (sen finaĵo).
3. — En tiuj konstruaĵoj kiam oni estis junaj, oni lernis legi.
4. — Esperanto estas tia.
5. — Sed la studado de Esperanto ne devas esti tia.
6. — Sufikso. — Kiam ĝi estas verda, la esperantistoj ĝin ŝatas (sen finaĵo).
7. — Por muzikistoj, ili estas sep. — Ne estas viro.
8. — Sufikso kiu montras lokon. — Membro.
9. — Faritaj el tiu materio estas viaj ŝuoj (sen finaĵo). — La virinoj estas sklavinoj de tiu kaprica feino (sen finaĵo).
10. — Nombra sufikso. — Nombro.

### VERTIKALE

1. — Malgranda persono kiu apartenas al la bela sekso.
2. — Verba finaĵo. — Ili estas sep.
3. — Franca nomo de lilio. — El tio oni faras velojn.
4. — Milita vesto.
5. — Malgranda kaj malutila besto. — Sufikso kontraŭa al la prefikso pra.
6. — Fraŭlo edziĝonta petas tion de ŝia fianĉino (sen finaĵo). — Du je la nazo.
7. — Bela, forta sentado.
8. — Se la via estus agrabla kaj bela, eble vi amus ŝin.
9. — Adverbo. — Ofte oni faras tion per ŝnureto.
10. — Ne homo, ne besto.

Kaj nun cerbumu kara legantoj ! Se vi trovas la solvon bonvolu ĝin sendi al nia revuo sed antaŭ la unua tago de la internacia semajno kiu okazos en Malo-les-Bains, Ni lotumos tri premiojn.